

kontraŭstaras. Sanger aldonis ke eksperimento sukcesis jam en 300 paroj, kiuj trinkis la medikamenton, sed plia observo estas necesa.

Jen alia japana eksperimento de D-roj Ŝirai kaj Iida el Tokushima. Ili penas krei artefaritan flavan korpon en la ovario, injektante trofoblastohormonon, t.e. preparaĵo el la homa placento. La medikamento akcelas la funkcion de la „flava korpo“, kiu povas malhelpi eligadon de ovo aŭ ovuladon. Unu injekto monata aŭ en unu ciklo. Ĉe bestoj oni sukcesis jam, sed ĉe homoj, la dozo kaj tempo ankoraŭ ne estas determinita kaj bedaŭrinde ĝi apartenas al la estonto.

9. Konkludo.

Mi rakontis sufiĉe longe pri la stato de tro multa nombro de loĝantoj en la nuntempa Japanujo kaj diris ke pro tio japanoj deziras mem kontraŭstari al tiu aktuala problemo, serĉante ian solvon. Kuracistaj kontribuoj pruvas ke ankaŭ ili laboras por tiu celo per sia medicina kapablo. Sed de la medicina vidpunkto, mi diras, neniu kontentiga metodo estas ĝis nun havebla.

Metodo ideala kaj samtempe efikoplena, tia ne povas ekzisti „teorie“, ĉar la afero de evito de gravediĝo mem estas ago kontraŭnatura, kontraŭ la Dia volo. Dio permesas nur abstinon, se oni ne volas fekundiĝi.

Metodoj varias laŭ landoj kaj nacioj. Iu metodo, bona en unu lando, ne povas esti importata en alian kun la sama efiko. Tio estas vero. Kaj ni, japanoj, do devas peni utiligi tiujn metodojn, kiuj estas taŭgaj al nia vivo.

Gesinjoroj, ni paroladis pri aferoj malĝojaj, mi plendis tro multe kaj mi timas, ĉu mi eble tedis vin.

Ni estas Esperantistoj. Nia Majstro Zamenhof havis en sia idealo altan homaman principon: la „Homaranismo“. Unu mondo, unu familia rondo kaj unu helpa lingvo! Homoj povas loĝi en ĉiu loko de la mondo, kiel pacaj laboristoj. Homoj povas veturi ĉien ajn kaj esti bone komprenataj ĉie ajn. Tia Esperantujo certe estas utopio en malproksima estonteco, sed almenaŭ Esperantistoj povas kompreni la idealon kaj pro tio konsenti en la japana malfeliĉo. Mi ne volas peti simpatian de alilandanoj. Mi nur volas konigi la nunan staton kaj samtempe malkaŝi la belan idealon de la tuta homaro, kiu estas sendube komuna por ĉiu nacio kaj kiu ĉiam kreas al Esperantistoj forton batali por la lingvo Esperanto!

RECENZO KAJ BIBLIOGRAFIO.

408.92:413

Plena Vortaro de Esperanto, 4-a eldono, 512 paĝoj plus **Suplemento** 64-paĝa, formato 98 × 135 mm²; tole bindita; prezo: us. \$ 3.—; eldonaĵo de S.A.T., 67 avenue Gambetta, Paris-20.

Ĉi tiu 4-a eldono, same kiel la 3-a, estas fotografa, ofseta represo de la 2-a eldono de ĉi tiu ĝenerale konata, ne-oficiale aŭtoritata Esperanto-vortaro. Nova estas nur la 64-paĝa aldonajo kiu enhavas multe da vortoj el la poezia fakvortaro de Parnasa Gvidlibro de Kaloscay kaj Waringhien, krome multajn fakajn terminojn, kaj terminojn por multaj freŝdataj aperaĵoj (ekz.: *cibernetiko*, *buldozo*, *eskalimunaj nilonŝtrumpoj*, *jipo* (Kon-Tiki: ĝipo!), *napalmo*, *nazio*, *skotero*).

Plena Vortaro en la komenco de la tridekaj jaroj estis la libro kiun mi plej ofte konsultadis. Preskaŭ ne pasis tago en kiu mi ne serĉis ion en ĝi. Kaj dum mi serĉis kaj foliumis, kompreneble trafis mian atenton ankaŭ aliaj vortoj, mi legis iliajn difinojn, kaj tiamaniere mi akiris relative grandan vortoscion. Nu, ĉi tiu 4-a eldono kredeble por neniu ludos similan rolon, ĉar la malgrandeco de la literoj kaj la okulstreĉa legado vere ne invitas al iom longedaŭra legado. Foje mi devis eĉ miopigi min surmetante duan paron da okulvitroj (tridiotriaj) por certiĝi pri ia litersekvaĵo (ekz. ...*ili*...). Tamen oni ne povas nei ke la preso estas tre neta kaj meritas ĉian laŭdon. Sed la reduktio de ĉiuj longoj al 2/3 de la originala amplekso praktike signifas ke la limo de legebleco estas atingita. La avantaĝo estas la poŝformato de ĉi tiu vortaro (105 × 140 × 18 mm³) kaj kredeble malpli alta prezo. La papero estas maldika kiel tiu sur kiu presiĝis ĉi tiu recenzo.

Kaj nun pri la enhavo de ĉi tiu 4-a eldono de Plena Vortaro. Fakte sufiĉas paroli pri la aldonajo, kies enhavo Prof. Waringhien ĉerpis el multe pli ampleksa materialo disponebla.

Rilate al la difinoj mi devas rimarkigi ke tiuj de fakaj terminoj ĝenerale estas pli bonaj ol tiuj en la ĉefa parto, sendube pro tio ke pluraj fakuloj prizorgis ĉi tiujn fakajn terminojn kaj iliajn difinojn. Tamen kelkaj difinoj ŝajnas al mi kritikindaj, ekz. tiuj pri *depresio*, *gaspedalo*, *humida*, *cipselo* (latina nomo *Apus*, anstataŭ *Cypselus*), *gasometro*, (sub *metro*, komparu kun *gasometro* kiel ne kunmetita vorto en la ĉefa parto de la vortaro), *termostato*, *rubekolo* (ne: „malgranda specio“, eventuale: „malgrandula specio“), *seleno* (ne: lumsentivaj ecoj, sed: lumsentiv(ĉ)o), *sonstreko* (misuzo de „efekto“, cetere ankaŭ de „streko“), *tropeolo* (el familio de tropeolacoj, ne de geraniacoj), *vitaminoj* (jam ne ĝenerale, „de malbone konata kemia konsisto“ kaj bezonataj en pli grandaj ol „infinitzimaj kvantoj“), *zostero* (ne „specio de algo“, sed planto el la fanerogama familio de potamogetonacoj). Notinde estas ke la vortoj „*paniklo*“ (en la difino de „*paduso*“) kaj „*operkulo*“ (en la difino de „*pilĉardo*“) mem ne estas

difinitaj en ĉi tiu vortaro. Interesa estas la anstataŭigo de la substantiva karaktero de la radiko „*plak*” per verba karaktero. Ne tute kontentiga estas la formulo de *sakarino*, kaj mi miris pri tio ke laŭ vortaro eldonita de SAT *rupio* estas „arĝenta monunuo” en Hindujo”!

Se nun ni turnas nian atenton al la terminoj mem, ni ne povas ne konstati plurajn tendencojn neniel salutindajn. *Z a m e n h o f*, tre saĝe, ĉion faris por eviti homonimojn kaj ĝenerale sukcesis en tio uzante ĉiaspeciajn sagaciajn rimedojn: elekto de fontlingvo, apliko de varioj en la konsonantoj kaj vokaloj (ekz.: *poŝto*, *koakso*). Cetere li celkonscie strebis al ekonomio en la radikaro. La nuntempa evoluo, tamen, devas plenigi nin de zorgo, ĉar pli kaj pli svarmas unupartite la fakte superflujaj radikoj (ekz.: *reflektoro* (reflektilo), *stovo* ((hejt)-forno), *gazono* (razeno)¹⁾, *vermiljono* (1) (cinabro), *volatila* (vaporigema, vaporigebla), *domini* (superregi), kaj multaj aliaj), kaj aliparte la homonimoj (ekz.: *ĝiri*, *spino*, *kulmo* (kulmo (1) = ŝalmo (1))¹⁾, *reakcio*). Ankaŭ troviĝas, feliĉe, ekzemploj montrantaj kontraŭan tendencan (*ŝorbeto*, *momento* (ne preseraro, kiel supozis s-ro J. Réguilo Pérez en *Boletín* de niaj hispanaj amikoj), *dispozicio* (eĉ se ĝi mem havas tri signifojn!)).

Nia plej bona vortaro miaopinie ankoraŭ estas la Enciklopedio Vortaro de E. Wüster, nia plej kompetenta kaj plej talenta vortaristo, kaj nur pro gravaj kaŭzoj ni deviu de ĝiaj rekomendoj. Tro ofte la postaj vortaristoj preferis aliajn formojn esence malpli taŭgajn, sed pli konformajn al la respondaj terminoj nacilingvaj. Tute ĝenerale oni povas diri, ke la mistendencoj rimarkitaj estas nur aspektoj de unu fundamenta mistendenco: troa prefero por „naturalismaj” formoj, anstataŭ por „sistema boneco”. Ĉe kelkaj neologismoj mi dubas ĉu la formoj proponitaj estas la plej rekomendindaj, aŭ ĉu entute ni bezonas ilin: *anaŭfiks(i)o*, *ampliŝ(ik)i*, *gan(g)stero* (apenaŭ prononcebla kun g!; komparu: *anstromo*), *pulov(e)ro*, *jazo* (*ĝazo*), *ĵipo* (*ĝipo*), *pampelmuso* (en „Esperanto” mi iam legis: *pampelmo*), *Israelo* (*Izraelo*; sub „cionismo”), *gaŭĝo* (Enc. Vortaro: *kalibrilo*), *sakarozo* (*sukrozo*), *spino* (termino el atomteorio por kiu mi ankaŭ jam legis: „*ŝpino*”; ambaŭ ĉi tiuj formoj estas homonimaj kaj tial evitindaj), *radaro* (homonimo; *radioehado*, *radioehilo*), *reakcio* (Wüster: *reefiko*), *basigisto* (la formo de ĉi tiu termino ŝajnas al mi apenaŭ pravigebla; kaj kiel nomiĝu „malbasigisto”?).. La nomoj de koloraĵoj prefere deriviĝu per la sufikso *aj*: *metilviolajo*, *metilenbluajo* (komparu Enc. Vortaron). Oni notu ke sub „*generatoro*” devas temi pri „*Van der Graaff-generatoro*” aŭ prefere „*generatoro laŭ Van der Graaff*” (sed ne *Van de Graaf*). Sub „*sono*” prezentiĝas la termino „*sonstreko*”, kaj ŝajnas al mi ke ĉi tie la vorto *streko* estas malprave uzata anstataŭ *stri(et)o*. Kaj ni finu kun la *reĝo*, laŭ unu el la difinoj: *karto* ... *ranganta ĵus* (! anstataŭ *tuj*) *post la aso*”, por konstati ke ĝusta uzo de ĉi tiu malfeliĉa, multe misuzata adverbo *ĵus* eĉ por vortaristo foje estas tro malfacila, kaj por rekomendi al ĉiuj legantoj serioze studi la difinojn kaj ekzemplojn de *ĵus*, *ĝuste*, kaj *tuj*.

¹⁾ Komparu p. 47 en ĉi tiu kajero.

Esperu ni ke post ne tro longa tempo ni havos Plenan Vortaron kiu ne nur registras, sed ankaŭ rekomendas kaj malrekomendas, kun neta prefero por la sistema boneco, mallonge: kun ĉiuj tiuj superaj ecoj kiujn posedas la Enciklopedio Vortaro kies sola malavantaĝo por internacia uzo estas, ke ĝi donas ne difinojn en Esperanto, sed germanlingvaj tradukojn. Tamen, finfina apero de la dua duono de ĉi tiu superega vortaro estus por nia lingvuzo gravega evento. Ĉu ĝia eldono por la komuna risko de pluraj el la pli gravaj esperanto-eldonejoj eble povus esti konsiderata? Ĉiuokaze, dum ni ne havas ĝin, servu al ni la Plena Vortaro kaj ĝia Suplemento, kiujn ni uzu kun singardo kaj kritiko.

W. P. R.

408.92 : 8-8

Fundamenta Krestomatio de D-ro L. L. *Z a m e n h o f*, 17-a eldono, 446 p., 13 × 20 cm², tole bindita, prezo 18 anglaj ŝ. 9 pencoj, eldonejo „The Esperanto Publishing Company”, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Ni povas tre ĝoji pri tiu ĉi nova eldono de nia intime konata Zamenhofa krestomatio. Ĉar unue ĝi havas indan kaj belan aspekton kaj estas tipografie plej zorge eldonita. La literoj estas pli facile legeblaj ol en antaŭaj eldonoj.

Pli grava estas la dua kialo de nia ĝojo. La originala teksto estas plene konservita. En la antaŭparolo al la nova eldono ni legas pri Fundamenta Krestomatio: „Kvankam ĝia lingvaĵo ankoraŭ estas belstila kaj plene komprenebla, ĝi en kelkaj rilatoj impresas arkaikie ... Jam de multaj jaroj do spertuloj konstatis, ke la Fundamenta Krestomatio devus aperi en elfunde reviziita eldono, por ke ĝi plue plenumadu sian originalan celon” (nome prezenti modelon de esperanta stilo). Feliĉe oni decidis dum Universala Kongreso en Zagreb, ke reeldonoj de Zamenhofaj verkoj estu senŝanĝaj, kaj ke oni indiku per piednotoj la ŝanĝojn, kiujn Zamenhof mem plejble aprobus. Tio okazis en tiu ĉi eldono. Pro tio la verko fariĝis dokumento pri la evoluo de Esperanto, eĉ pri la Zamenhofa stilo, ĉar sinjoroj W. B a i l e y (lingva komitatano) kaj W. D o w n e s (akademiano) kiuj prizorgis la reviziadon, celis plej fidele redoni en la ŝanĝoj piednotaj la opinion kaj la plej maturan stilon de Zamenhof. Pro tio oni trovas en la notoj plurajn referencojn al la Zamenhofaj verkoj.

La tuta piednotaro montras ke la nuna stilo iĝis pli perfekta, pli klara, pli konsekvenca, pli logika ol tiu en la originala eldono. Mi specimene faris kalkulon kaj trovis ke oni bezonis averaĝe 2.8 notojn po paĝo por modernigi la stilon. Oni povas rimarki ke la persona prefero de unu el la reviziintoj (Bailey) kelkfoje devias de la Zamenhofa (p. 72 1, 125 2, 148 3, 150 3, 164 6, 170 1 k.a.). Kaj la recenzinto konfesas, ke li kelkfoje preferas la guston de Zamenhof super tiu de la reviziintoj (ekz. 32 3, 70 3, 77 4, 177 1, 353 1 kaj 2). Ankaŭ en lingvaj aferoj gustoj regas.

Wanda *Z a m e n h o f* verkis mallongan enkondukon, kiu valore distingas ĉi tiun belan libron.

G. F. M.